

Esperanto 270 aktuell



40. Jahr (2021) №6 (270)

Informationen für Esperantofreunde in Deutschland und Österreich



Partoprenantoj de la 9-a Esperanto-Migrado Aŭtuna en Neustadt.

Interkultura Centro Herzberg: Studentoj esploras la Esperanto-urbon.

Aŭstria Esperanto-Federacio: El Graz kaj Vieno al Londono. Protokoll der

Bundesversammlung vom 30.10.2021 in Osterode am Harz. Erasmus+ – vojaĝ-stipendioj

2021-2022. Nova estro de LAMA. Partnereco inter BAVELO kaj ANEB, Burundo. 18 -a Rata Rendevuo en Porta Westfalica kaj Bückeburg. Postrikolto pri okazinta TRAKO 2021.

Signifa okupo dum la pandemia izolado. Malnovaĵoj de GEJ. Perloj de Gartig Phone.

Deutscher Esperanto-Bund e.V. Germana Esperanto-Asocio r.a.

Amtsgericht Berlin VR 13651 B
www.esperanto.de/deb (Netzpräsenz)

Bankkonto (por membrokotizoj kaj donacoj)
/ **Bankverbindung** (für Mitgliedsbeiträge und Spenden): HELADEFIERB,
Sparkasse Odenwaldkreis,
DE 3250 8519 5200 4011 4571.
Spenden und Mitgliedsbeiträge für den D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

Oficejo / Geschäftsstelle: Esperanto-Laden
Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,
Leitung: **Sibylle Bauer**
030 / 5106 2935, 0800 336 3636
Fax: 030 / 4193 5413

sibylle.bauer@esperanto.de

Membropripizorgado / Mitgliederbetreuung
DEB: 0800 - 3 36 36 36 – 21
DEJ: 0800 - 3 36 36 36 – 22

Briefpost senden Sie bitte, soweit keine andere Anschrift angegeben, an die Geschäftsstelle. Sie wird von dort elektronisch weitergeleitet. Die angegebenen **Telefon-Durchwahlnummern** sind nach der Rufnummer **0800 - 3 36 36 36** zu wählen.

Estraro GEA / Vorstand DEB

Netzpost an / **retmesaĝo al** gea.fe@esperanto.de

Jedes Vorstandsmitglied ist individuell erreichbar per E-Post-Adresse in der Form *vorname.name@esperanto.de*.

Prezidanto / Vorsitzender

Ulrich Brandenburg, Durchwahl: -5111
gea.prezidanto@esperanto.de

Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender

Andreas Emmerich, Durchwahl: -5112

Trezoristo / Kassenwart

D-ro Matthias Hecking, Durchwahl: -5113

Sekretario / Schriftführer

Nils Brinkmann, Durchwahl -5125

Administrado / Verwaltung

Barbara Brandenburg, Durchwahl -5125

Suborganizoj / Unterorganisationen

Andreas Diemel, Durchwahl: -5114

Informteknologioj / Informationstechnologie

Franz Kruse, Durchwahl: -5119

Meza generacio / Mittlere Generation

Michaela Stegmaier, Durchwahl: -5126

Jugendvertreter / Junulara reprezentanto

Michael Vrazitulis, Durchwahl: -5118

Germana Esperanto-Junularo /

Deutsche Esperanto-Jugend

Michael Vrazitulis, Durchwahl: -5211

michael.vrazitulis@esperanto.de

Komisiitoj / Beauftragte

esperanto.de/deb/beauftragte

Gazetaraj kaj publikaj aferoj

/ **Presse und Öffentlichkeitsarbeit**

Louis von Wunsch-Rolshoven,

Durchwahl: -111 • Fax Durchwahl: -112
louis.von.wunsch-rolshoven@esperanto.de
Komisiito por retaj kunvenoj / Beauftragter für virtuelle Treffen **Heinz-Wilhelm Sprick**,
gea.zoom@esperanto.de, tel. 0800-3363636-5128

Komisiito por rondvojaĝoj / Rundreisen,
Durchwahl -5123

Uli Ender, uli.ender@esperanto.de

Informmaterialo / Informationsmaterial

Goar Engländer, Durchwahl: -5127
goar.engelaender@esperanto.de

Medienecho

Hermann Kroppenberg, Durchwahl: -5121
medienecho@esperanto.de

Libroservo / Bücherdienst

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**,
Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz,
Durchwahl: -5122, buchversand@esperanto.de,
www.esperanto.de/buchversand

Komisiito Interreta Redaktado /

Beauftragter Internetredaktion

Thomas Bormann, Durchwahl: -5117

thomas.bormann@esperanto.de

Vertreter des DEB in der EEU-Versammlung/Reprezentanto de GEA en la asembleo de EEU: Klaus Leith
klaus.leith@esperanto.de

Pliaj adresoj / Weitere Adressen

Germana Esperanto-Junularo (GEJ) /

Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)

Katzbachstr. 25, 10965 Berlin,
030/4285 7899, Fax: 030/4193 5412
www.esperanto.de/gej (Netzpräsenz)

Interkultura Centro Herzberg (ICH) /

Bildungszentrum des D.E.B.

Komisiitoj/Beauftragte: **Zsófia Kóródy** (instruado), **Peter Zilvar** (klerigado kaj kulturo), Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, die Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax (05521) 1363, Durchwahlen: -411 (Tel), -412 (Fax), ich@esperanto.de, www.esperanto.de/ich

Germana Esperanto-Instituto /

Deutsches Esperanto-Institut

Prof. D-ro/Dr. **Martin Haase**, Lehrstuhl für Romanische Sprachwissenschaft, Uni Bamberg, Durchwahlen: -431 (Tel), -432 (Fax), martin.haase@esperanto.de, www.esperanto.de/dei

Germana Esperanto-Biblioteko /

Deutsche Esperanto-Bibliothek

p/a. **Karl Heinz Schaeffer**, Schulstr. 17, 73432 Aalen, Durchwahlen: -421 (Tel), -422 (Fax)
biblioteko@esperanto-aalen.de
bibliothek-aalen@esperanto.de
www.esperanto.de/bibliothek

Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung

Andreas Emmerich, estraro@fame-stiftung.de (nur por FAME)

Stiftung Mondo

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal,

030/6920 4846-1, stiftungmondo@gmail.com,
Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart eG, BLZ 600 901 00.

Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

Aŭstria Esperanto-Federacio /

Österreichischer Esperanto-Verband

aej@esperanto.at, www.esperanto.at

Aŭstria Esperanto-Junularo /

Österreichische Esperanto-Jugend

Weissgerberlande 30-36/5/11, 1030 Wien,
aej@esperanto.at, <http://aej.esperanto.at>

Esperantomuzeo Vieno /

Esperantomuseum Wien

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien,
+43/1/53410-731, Postanschrift:
Österreichische Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 25, 1015 Wien, plansprachen@onb.ac.at, www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm

UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj / Bundesbeauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA Germanio / Deutschland

D-ro / Dr. **Wolfgang Schwanzer**, Adressen siehe mittlere Spalte: Libroservo/Bücherdienst

Aŭstrio / Österreich

Leopold Patek, Martinstr. 104/38,
3400 Klosterneuburg, Poŝtel.
+43/66473611289,
aon.913548977@aon.at

Esperanto aktuel

ISSN 0942-024 X

Eldonisto / Herausgeber

Deutscher Esperanto-Bund e.V.,
der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

Redaktista teamo / Redaktion:

Stano Marček (Martin/Slovakio),

Yashovardhan Singh, Im Johannistal 23,
42119 Wuppertal. Durchwahl: -54

Kunlaborantoj / feste Beiträger:

Hermann Kroppenberg (Medienecho),

Utho Maier (Bibliothek), **Peter Zilvar** (ICH)

Presejo / Druck: Alfaprint, Martin, Slovakio
Esperanto aktuel kun -kune- havas ses numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la oficejo (vidu maldekstre supre) por 19 € (de eksterlando: 25 €) jare.

Esperanto aktuel mit -kune- erscheint sechs Mal pro Jahr. Abonnierbar bei der Mitgliederbetreuung (s.o.). Abonnement: 19 € (Ausland: 25 €) jährlich; für ordentliche Mitglieder im Beitrag enthalten.

Anoncoj / Anzeigen:

Skribu al / Schreiben Sie an: deb@esperanto.de

Kontribuoj / Beiträge

Bv. sendi viajn kontribuojn (en formato *.doc a.s.) al ea@esperanto.de, por n-ro 2022/1 ĝis la 15-a de januaro 2022. Paperaj kontribuoj nur esceptkaze, tiam al Yashovardhan Singh (vidu supre). Senden Sie Ihre Beiträge bitte (im Format *.doc o.ä.) an ea@esperanto.de, für Nr. 2022/1 bis zum 15. Januar 2022. Papierbeiträge nur im Ausnahmefall, dann an Yashovardhan (s.o.).



Karaj legantoj,

mi skribas ĉi tiun leteron meze de novembro. Multaj aferoj okazis lastatempe. Mortis bona amiko: Wolfgang Bohr, pri kiu vi legos aliloke en ĉi tiu eldono. Kunvenis Federacia Asembleo (jarĉefkunveno) kaj Asocia Konsilantaro de GEA. Elektiĝis nova estraro. Venis konfirmoj pri ricevo de EU-subvencioj el du diversaj Erasmus+-programoj. Pli da esperantistoj partoprenis en la EU-konsultado pri la estonteco de Eŭropo. Proksimiĝas la venontaj renkontiĝoj – printempe PSI, dum pentekosto la kongreso en Oldenburg – sub la Damokla glavo de revenanta pandemio. Kaj la estrino de nia oficejo Sibylle Bauer pensiĝos.

Pri la Federacia Asembleo vi trovos protokolon en ĉi tiu numero. Ĉar same kiel en 2020 ĉi-pentekoste ne eblis ĉeesta kongreso, ni duan fojon kombinis ĝin kun la regula kunveno de Asocia Konsilantaro kaj renkontiĝis la 30-an de oktobro en Osterode apud Herzberg. Multan dankon precipe al Zsófia Kóródy pro la subteno surloke. Por la „Esperanto-urbo“ la balotoj de la 26-a de septembro alportis kelkajn ŝanĝojn: novajn estrojn de la distrikto Göttingen kaj la urbo Herzberg, novan reprezentanton en la federacia parlamento. Ni estas en kontakto kun ĉiuj tri kaj esperas daŭrigi la bonan kunlaboron.

GEA havas novan estraron. Post multaj jaroj la estraron forlasis Wolfgang Bohr kaj Oliver Walz. Al ambaŭ ni ŝuldas koran dankon, i.a. pro la landa kaj faka agadoj, la organizado de multaj renkontiĝoj, la kongreso en Zweibrücken kaj la integriro de Sarlanda Esperanto-Ligo. Nove elektiĝis Michaela Stegmaier el Braunschweig (kies estrarano signife reduktas la mezuman aĝon de la kolegaro!). Ŝi okupiĝos ĉefe pri nia meza generacio: kiel eviti, ke homoj perdiĝu en la truo inter GEJ kaj GEA, kaj kiel stabiligi nian membronombron? Bonan ekzemplon donis la GEJ-prezidanto Michael Vrazitulis, kiu estis veninta al Osterode el sia nuntempa loĝloko en Italio. Andreas

Diemel transprenis la rilatojn kun landaj ligoj kaj fakaj organizoj, kiujn ĝis nun prizorgis Wolfgang Bohr. La aliaj respondecoj en la estraro restis sensanĝaj. Por mi mem komenciĝis la laŭstatute lasta oficperiodo. Urĝas do trovi posteulon.

En septembro kaj oktobro ni ricevis la informojn de la germana Erasmus+-agentejo, ke niaj du subvencijetoj estas pozitive deciditaj: unu el ili pri vojaĝstipendioj inter 2021 kaj 2023 (vidu apartan informon en ĉi tiu numero), la alia por komuna projekto kun Esperanto Nederland. Ties temo estas „daŭripovo“, ne hazarde ankaŭ la temo de la venonta GEA-kongreso en Oldenburg. La EU-subvencioj estas bona novaĵo por nia kasisto, sed ankaŭ agnosko por la kvalito de nia laboro (kaj por la kvalito de niaj subvencijetoj, en kiuj multe helpis Sara Spanò). Temas pri subvencioj por difinitaj unufojaj projektoj, ni do ne tro kutimiĝu al ili. Kaj ni uzu ilin: estus iom hontige, se ni devus redoni monon pro manko de intereso!

Eŭropa Unio por ni gravas ne nur kiel monfonto. Kun rimarkinda sukceso esperantistoj en tuta EU partoprenas en la publika konsultado por la „Konferenco pri la Estonteco de Eŭropo“. Necesas nun atingi, ke la multaj subtenoj, kiujn ricevis por-Esperantaj proponoj en la unua etapo, trovu atenton ankaŭ en la etapoj kiuj sekvas. Ĝus la prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio Seán Ó Riain en tiu senco skribis al la EU-parlamentanoj, nomumitaj kiel delegitoj al la Konferenco.

La Esperanto-movado ĉiam ankoraŭ vivas en kaj per siaj renkontiĝoj, eĉ se lastatempe multaj el ili „virtualiĝis“ kaj ne plu povis okazi ĉeeste. Des pli rimarkinda estas la sukceso de nia aŭtuna migrado EMA, kiun nun la duan fojon organizis Gerald Roemer. Ĉi-jare la celo estis la vinstrato ĉirkaŭ Neustadt, venontjare EMA okazu en Teutoburger Wald apud Detmold. Mezo de oktobro ŝajnas esti bona sezono, en kiu la virusoj ankoraŭ malmultas kaj eblas vivi preskaŭ normale. Ni nun tre esperas pri la jam tradiciaj renkontiĝoj – la familia renkontiĝo PSI en Braunschweig ĉirkaŭ pasko kaj pri la 99-a Germana Esperanto-Kongreso en Oldenburg.

Kaj ankoraŭ unu novaĵo: Sibylle Bauer pensiĝos kaj forlasos Berlinon. Ŝi estris nian Berlinan oficejon dum 8 jaroj. Ni estas serĉantaj novan kunlaborantinon kaj esperas prezenti al vi posteulinon en la venonta numero de *Esperanto aktuell*.

Intertempe mi deziras al vi trankvilajn festotagojn kaj feliĉan novan jaron!

Ulrich Brandenburg,
prezidanto de GEA

Enhavtabelo/Inhalt

1: Partoprenantoj de la 9-a EMA en Neustadt (legu sur la p. 22).

2: Adresoj.

3: Germana Esperanto-Asocio: Karaj legantoj. Enhavo.

4-5: El bibliotekoj kaj arkivoj: Folge 63 – Ĉu vi ankoraŭ serĉas taŭgan kristfestdonacon? – Jen mia rekomendo!

6: Interkultura Centro Herzberg: Studentoj esploras la Esperanto-urbon. Erasmus+ renkontiĝo. Kalendaro 2022. Forpasis Wolfgang Bohr.

7-9: Aŭstria Esperanto-Federacio: Rakonto pri vojaĝo tra la tempo, parto du. El *Graz* kaj Vieno al Londono. Esperanto en *Graz*-a studenta medio dum la 60-aj jaroj.

10-14: Germana Esperanto-Asocio: Protokoll der Bundesversammlung vom 30.10.2021 in Osterode am Harz. Nachweis der Spende / Zuwendungsbescheinigung. Erasmus+ – vojaĝstipendioj 2021-2022. Presseinformation des Esperanto-Buchversandes aus Mainz.

15-18: El la landaj kaj fakaj ligoj: Landesverband Niedersachsen/Bremen (EMAS) mit neuer Führung. Vollversammlung des Esperanto-Landesverbandes Rheinland-Pfalz (Esperanto-RLP) am 9. Oktober 2021 in Lahnstein. Nograza estro de LAMA. Partnereco inter BAVELO kaj ANEB, Burundo. Antaŭ 60 jaroj mortis Baldomero Zapater.

19: Kalendaro.

20-22: Medienecho.

22-24: Aranĝoj: Piede tra Palatinato: la 9-a Esperanto-Migrado Aŭtuna (EMA). 18-a Rata Rendevuo en Porta Westfalica kaj Bückeburg. Postrikolto pri okazinta TRAKO 2021.

25-30: ~~kune~~ – revueto de Germana Esperanto-Junularo: Ein keksiges Wochenende. Pri mia volontula jaro. Signifa okupo dum la pandemia izolado. JES 2021/22 ne okazos. Malnovaĵoj de GEJ. Perloj de *Gartic Phone*. Sala kuko.

31-32: Aranĝoj: Printempa Semajno Internacia 2022. Braunschweig, interesa urbo kun multe da historio.

La mondo de libroj kaj periodaĵoj – Esperanto kaj aliaj planlingvoj

Novaĵoj, sciindaĵoj kaj pripensproponoj el Germana Esperanto-Biblioteko Aalen

Parto 63 – Ĉu vi ankoraŭ serĉas taŭgan kristfestdonacon? – Jen mia rekomendo!

En tiu ĉi adventa kaj vintra tempo antaŭ la jarfino kaj kristfestaj tagoj, indas prezenti al pli vasta legantaro infanlibreton, kiun mi tre varme rekomendas kiel donaco, ĉu por viaj idoj, ĉu por amikoj, ĉu por vi mem – ĉiel ajn.

Георги Михалков (Georgi Michalkov) tute freŝe verkis vintran rakonton por infanoj (6-12 jaraj), uzante sian kutiman pseŭdonimon (aŭ plumnonon) **Julian Modest**.

Mi volas tie priskribi miajn impresojn, kvankam rekomendo ne necesus, ĉar jam la aŭtoronomo Julian Modest por Esperanto-amikoj kvazaŭ garantias la kvaliton.



Sed unue pri kelkaj formalajoj:

„Mirakla fabelo“ de Julian Modest estas originale verkita en Esperanto: Temas pri 43-paĝa libreto (23x18 cm) kun kolora solida kovrilo, kiu aperis ĵus en Antwerpen ĉe la Eldonejo Libera, havebla kontraŭ 18 €; la provlegadon faris Yves Nevelsteen.

Kiu ne jam konas la Eldonejon Libera, tiu vizitu ties retejon <https://e-libera.weebly.com> aŭ la vikipedion! Tiun eldonejon fondis Lode Van de Velde² en 2016 por disponigi al ĉiu verkema Esperantisto facilan eblecon eldoni ion, ĉu originale verkitajn librojn en Esperanto, ĉu tradukojn aŭ eĉ multlingvajn librojn;

1) https://eo.wikipedia.org/wiki/Eldonejo_Libera

2) https://eo.wikipedia.org/wiki/Lode_Van_de_Velde

tiel ne plu necesas propra investo, ekzemple pro altaj postulitaj eldonkvantoj.

Se vi ne jam konas la aŭtoron Julian Modest, mi rekomendas https://eo.wikipedia.org/wiki/Julian_Modest, kie ankaŭ troviĝas listigo de liaj verkoj, aŭ vi iru al <http://verkoj.com/verkistoj/julian-modest/>! Julian Modest estas ankaŭ membro de la Esperanta PEN-Centro³.

La verko estas dediĉita „Al mia kara nepino Zsafia Mihalkov“ kaj celas esti por malgrandaj kaj ne tre malgrandaj infanoj, kial do ne ankaŭ al vi?

Demandu vin: „Ĉu okazas mirakloj?“ – La verkisto asertas, ke Jes! Li rakontas pri multaj mirakloj.

En malvarma vintra nokto iu neĝohomo, farita de infanoj ĉirkaŭ la 7-jara Viktor, subite ekparolas. Ĝi deziras ne plu esti sola, sed celas havi amikojn por kun ili travivi neordinarajn aventurojn. Julian Modest priskribas mondon mirindan, kie ĉio estas alloge kaj fabele bele:

„La neĝohomo rigardis al la ĉielo. Kiom da steloj estas tie! – diris li. – La ĉielo estas bela. Nun mi unuan fojon vidas la noktan ĉielon. Hodiaŭ mi unuan fojon vidis infanojn. Bonege, ke la infanoj estas ĝojaj, gajaj.“

Viktor havas mirindan sonĝon: Iu ekfrapetas sur la fenestran vitron. Ekstere staras la neĝohomo: „Mi venis danki vin, ke vi kaj viaj geamikoj faris min, tamen nun mi estas sola kaj mi enuas. Ĉu morgaŭ vi farus ankoraŭ unu neĝohomon, por ke mi parolu kun li kaj ne enuu.“

La centran mesaĝon de la libreto mi taksas esti la sekva: „Ĉiuj devas scii, ke ie loĝas bona saĝa avo, kiu ĝojigas la homojn. Estas bonege atendi ion belan. Tio igas nin feliĉaj.“ (ĉapitro 8)

Ne estu tie mallonga rerakonto de la tuta historio, vi ja mem legu! Entute vi trovos 18 apartajn ĉapitrojn kun po eta rakonto unupaĝa. Jen estu almenaŭ listo kun la titoloj de la unuopaj ĉapitroj:

La neĝohomo; la malĝoja neĝohomo; la sonĝo de Viktor; la nova neĝohomo; en la lernejo; propono al vojaĝo; en la lando de Avo Nikolao; Avo Nikolao kaj Viktor; Avo Nikolao kaj Kalin; ĉe Kalin; la donaco; Viktor kaj Kalin en mirinda lando; en la dolĉaĵejo; flugantaj homoj; la infanoj; denove hejme; la gaja ludo; la adiaŭo.

Kio ŝajnas grava al mi: Julian ankaŭ modele instruas al la junuloj, ke ili alstrebu esti altruismaj: la knabo Viktor ne petas nur ion por si mem, sed precipe por sia amiko malsana, malriĉa.

„Ne gravas, ĉu oni donacos ion al iu ... Kiam iu havas malfacilaĵojn, li ne bezonas donacojn, sed veran amikon. Vera amiko pretas ĉiam helpi.“

Se mi nun skribas: „Mirakloj – ĉu tiuj ankoraŭ eblas en nia sekulara, tute racia nuntempa erao?“ – mi tuj volas malkaŝi, ke

3) https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanta_PEN-Centro

tiu estis nure retorika demando. Kial? – La verkisto ja skribas pri la enmensa mondo de junuloj, en kiu kompreneble povas aperi kaj okazi miraklaj eventoj; kaj ke temas efektive pri nuntempa kaj ne iama erao, tion pravas frazoj kiel la sekvaj: „En la ĉambro estis dek nanoj, kiuj faris ludilojn ...“ –

Tio ne jam estus iu indiko pri nia nuntempa mondo! Sed la daŭrigo tekstas „tamen la ludiloj estis komputiloj kaj poŝtelefonoj. Ĉi-jare Avo Nikolao donacos al ĉiu infano komputilon kaj poŝtelefonon.“

Tian sonĝon, revon aŭ imagon ja ne povus havi junulo el la tempo antaŭ kelkaj jaroj, ĉu ne?

Sed nun ni ne pensu, ke tia donaco „teknika“ estus afero rekomendinda, laŭ Julian!

La vojaĝo, kiun ebligas la du miraklaj neĝohomoj, kondukas nin kaj nian fantazion ne nur al la vintra domo de Avo Nikolao, sed ankaŭ en la Mirindan Landon, kie homoj kapablas flugi kaj abundas dolĉaj glaciaĵoj kaj ĉokolado senkoste haveblaj, sed kie oni ne vidas infanojn.

Kaj sen legi tion eksplicite, oni laŭ la enhavo bone kaptas la averton de Julian, ke tio tute ne estas bona kaj alstrebinda mondo, kie la infanoj ricevas komputilojn kaj poŝtelefonojn kiel ludiloj.

La infanoj de la Mirinda Lando ne plu estas videblaj ekster la domĉambroj, ĉar ili nur sidas hejme antaŭ la komputiloj. Tiu vizio hororigas la vizitantajn infanojn: „La infanoj sidas nur hejme, ili nenien iras, ne veturas, ne ludas ekstere kun aliaj infanoj ... ni devas foriri ...“

Tio sufiĉu, por logi vin mem legi kaj ĝui la libron (eble antaŭ ol vi fordonacos ĝin)!

Ne manku tie ankaŭ ioma kritiko mia (ne nepre nur negativa)!

- La lingvaĵo de Julian Modest tre plaĉis al mi kaj ŝajnas tre adekvata, ankaŭ kaj precipe por la celata publiko, la junaj homoj.
- Ne ofte oni renkontas tekstojn tute sen fuŝetoj (pri kiuj ja regule ne kulpas la aŭtoro mem, sed aliaj dum la produktado), danke al tre atentemaj, aglookulaj provlegantoj kiel Yves. Tamen enŝteliĝis kelkaj ne gravaj, kiuj ekz. estas:
 - en ĉ. 8. *Avo* (estu: Avo) kaj paĝofine estu forigita la citaĵ-ferma signo ” (cetere: la tuta teksto ja rezignas pri tiaj signoj),
 - ĉ. 10 komencas per *La sekvan tago Viktor iris*, sed tiu tempa adjekto devus esti komplete akuzativa, do: *La sekvan tagon*,
 - en ĉ. 12 oni legu afable anstataŭ *affable*,
 - en ĉ. 13 paĝofine legu *Helena proponis al ili* anstataŭ la presita *Helena proponi al ili*,
 - en ĉ. 14 paĝofine legu *Tio estas tute natura afero* kaj ne *Tio estas tute natura afere*.

Resume: laŭ mia impresoj, tio tute ne estas multa, kaj eble nur rimarkebla, se oni laŭtleĝas por infanoj (kion fari mi varme rekomendus).

Kaj jen montriĝas unu de la plej gravaj avantaĝoj de la eldonmodeloj kiel Lulu, ĉe kiu oni nur laŭ bezonoj (do post definitiva mendo de kliento au eldonejo/librovendejo) komencas la efektivan presadon de la verko. Ne plu ekzistas ampleksa stoko de pretaj paperaj ekzempleroj, al kiuj oni kelkfoje enŝovis apartajn slipojn kun indikoj de tajp-fuŝaĵoj, almenaŭ estintece. Se mi disponigas la listeton al Lode Van

de Velde, li certe baldaŭ preparos la necesajn ŝanĝojn, por ke venontaj presaĵoj estu plibonigitaj. Kiel mi nun resumu, antaŭ ol mi redonu la libron al la bretaro de nia Germana Esperanto-Biblioteko? Ĉu la legantoj kredos min, se mi asertas, ke ĝi iĝis amiko, dum mi ja traktas ĉiujn librojn kiel amikoj miaj?


Mi do devas skribi: la libro estas farita en tre bona kvalito, ne nur pro la uzita papero; ĝi transportas gravajn mesaĝojn, kiujn oni nepre peru al la junuloj (kaj ne nur al ili).

Mallonge:

Libro tre kara, spite al ĝia prezo (iom malkara) – mi konscias, ke mi nun intermiksas kaj la nuntempan kaj arkaisman uzojn de la esprimo kara, kiel faris jam nia majstro Zamenhofo kaj kiel ŝajne ankaŭ faras Julian mem.

Mi ne povas ne rekomendi varme, ke vi aĉetu ĝin, mendante per www.lulu.com/de/shop aŭ rekte de <https://e-libera.weebly.com/>. La jarfina tempo tre taŭgas por akiri bonajn donacojn, kaj libro ĉiam estas bonega donaco!

Laste mi kaptas la okazon (kaj la restantan spacon) por atentigi al eĉ pli freŝa eldonaĵo de la Eldonejo Libera: aŭtoro sama, Julian Modest, kaj eldonisto sama, Lode Van de Velde, sed literatura ĝenro alia.



„*La fera birdo*“ estas la plej nova novelaro de unu el la plej talentaj nuntempaj bulgaraj kaj Esperantaj verkistoj – Julian Modest. Ĉiu lia rakonto estas metaforo, kiu impresas per perfekta lingvo, eleganta stilo kaj filozofia sugesto. Modest spertas vidi kaj bilde priskribi ordinarnajn heroojn kaj okazintaĵojn, kiuj igas nin mediti pri la senco de la vivo, pri la homa ekzisto, pri la ĝojoj kaj ĉagrenoj, kiuj akompanas nin. La libro aĉeteblas ĉe eldonejo “Libera”:

Mi jam ricevis ĝin kaj povis foliumi tra la paĝoj, sed por ĝustatempe obei al la redaktifino (kaj cetere ankaŭ al la limigo de spaco en la nuna kajero) tute ne eblis skribi pli detalajn rimarkojn, ol la simplajn faktojn: la 99 paĝoj en formato A5 kostas nur 8 €. Investu tiun sumon ankaŭ!

Utho Maier

Okaze de la 200-a naskiĝdatreveno de Fjodor Dostojevskij la eldonejo „Sezonoj“, Kaliningrado, je la jubilea tago (11.11.2021) publikigis „Kvin rakontojn“ de Dostojevskij, en tradukoj de Grigorij Arosev kaj Aleksander Korjenkov. La nova bitlibro estas senpage elŝutebla (en pdf aŭ ePub) en la virtuala biblioteko de Sezonoj. Legu pli en la la novaĵretejo „La Ondo de Esperanto“ <https://sezonoj.ru/2021/11/dostojevskij-2/>

Studentoj esploras la Esperanto-urbon

En oktobro 2021 granda grupo de gestudentoj de la studfako "Interkultura Germanistiko" de la universitato Göttingen esploris la Esperanto-urbon Herzberg.

Tuj ĉe la alveno en la stacidomo Herzberg ili trovis multajn esperantlingvajn indikilojn. Peter Zilvar devis respondi multajn demandojn pri la Internacia Lingvo. Kelkaj eĉ sukcesis traduki la esperantlingvajn tabulojn en la germanan lingvon. Pri tio ili tre ĝojis.

Aparte ili interesiĝis pri la gramatiko kaj miris pri la logiko kaj simpleco. La lingvistikaj studentoj devenas el multaj landoj, ekzemple Indonezio, Ĉinio, Pakistano, Pollando kaj Ruslando. Ili miris, ke Esperanto ankoraŭ ne povis ludi la grandan rolon por neŭtrala komunikado en la mondo. Krom la Esperanto-placo apud la stacidomo ni komune migris al la Zamenhof-placo kun la Zamenhof-monumento.

Konstante la docentino kune kun la studentoj montris grandan intereson kaj starigis multajn saĝajn demandojn.

Por Peter Zilvar estis granda ĝojo, ke al Herzberg nun venas aparte interesitaj celgrupoj, kiuj laŭnature estas malfermitaj por la internacia kaj neŭtrala Esperanto-filozofio.

Multaj konstante fotis kaj eĉ notis multajn informojn. Kelkaj promesis eklerni Esperanton danke al diversaj ret-ofertoj. Tiu lingvistika instituto de la universitato Göttingen planas regulajn vizitojn en Herzberg.

Kelkaj docentoj kaj studentoj jam antaŭe memstare esploris la interesan Esperanto-urbon kaj aliaj volas reveni kun siaj geamikoj. Ni ĝojas, ke la Esperanto-urbo kune kun la Esperanto-centro pli kaj pli trovas specialajn „klientojn“.

Easmus+ renkontiĝo



De la 1-a ĝis la 3-a de oktobro 2021 okazis en Herzberg am Harz, en Germanio, Erasmus+-renkontiĝo de la projekto "Volontulado kaj asocia daŭripov-evoluo", samtempe kiel la pedagogiaj tagoj TORPEDO. Delegitoj el diversaj eŭropaj Esperanto-organizoj partoprenis en ĝi.

Kalendaro 2022

Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz-la Esperanto-urbo. Tel. 05521-5983. E-mail: esperanto-zentrum@web.de hejmpaĝo: esperanto-urbo.de

04.03. - 06.03.22: Esperanto-Weiterbildungsseminar (DEB-Filiale) in Herzberg

18.03. – 20.03.22: Esperanto-Wochenendkursus im Esperanto-Centro Herzberg

Forpasis Wolfgang Bohr (1954–2021)

La 8-an de novembro en la aĝo de 67 jaroj mortis nia samideano Wolfgang Bohr pro la sekvoj de trafika akcidento.

Wolfgang konatiĝis kun Esperanto kiel lerneano en sia hejmurbo Daun/Eifel. Li poste studis hortikulturon kaj instruis en faka lernejo. En la germana Esperanto-movado li rapide konatiĝis i. a. kiel la kunorganizanto de la familia renkontiĝo PSI (1991–2006 kaj 2013), en kiu li multajn jarojn mem partoprenis kun sia edzino Ilona kaj la gefiloj. De 2006 ĝis 2021 li gvidis la Esperanto-Ligon Rejnlando-Palatinato. Ekde 2011



li kunorganizis la aŭtunajn Esperanto-migradojn (EMA) de GEA, de 2007 ĝis 2021 li estis estrarano de Germana Esperanto-Asocio kun la respondeco pri landaj ligoj kaj fakaj asocioj. Regule Wolfgang ankaŭ partoprenis en lingvaj diskutoj.

Grava malsano jam dum iom da tempo devigis lin redukti siajn aktivecojn. En julio 2021 li kaj Ilona fariĝis viktimoj de la katastrofa inundo en la Ahr-valo, en kiu ankaŭ perdiĝis lia tuta Esperanto-kolekto. Ili ĵus estis komencintaj rekonstruon de la domo, kiam trafis lin akcidento kun aŭtomobilo, proksime de la hejmo. La restantajn semajnojn li pasigis en komato. Ni funebras pri multjara aktivulo de la Esperanto-movado en Germanio, fidinda konsilanto (al kiu mi mem en la lastaj jaroj ofte turnis min) kaj bona amiko. Niajn sincerajn kondolencojn al Ilona kaj la tri gefiloj!

Ulrich Brandenburg

Rakonto pri vojaĝo tra la tempo

Parto du – temas pri daŭrigo de la teksto, kiu aperis sur la paĝo 7 en Esperanto aktuell 2021/5.

Ili vivas multe pli mallonge, sed ni vivas multe pli longe. Ili estas sovaĝuloj, ni ne. Ni estas civilizitaj homoj.

Ili iras tra grandaj arbaroj, piedpremante la herbon. Oni multe parolas pri tio, kion ili faris, ktp. Ni spektas diversajn filmetojn pri ilia vivo, kiuj estas vere teruraj. Do, ni estas vere feliĉaj, ĉar ni apartenas al tiu ĉi ordigita socio. Ili estas malsanaj, tute ne estas sanaj, ĉar ili rifuzis ĉiujn vakcinadojn kiuj ekzistas, komencante per tiu granda pesto, okazinta antaŭ preskaŭ cent jaroj, kiam la kronviruso prenis trionon de la mortoj de la planedo.

Tio okazis en la jaro 2020-2022, tiel oni diris al ni. Ni nun havas tiujn vakcinadojn regulajn kaj konstantajn kaj ankaŭ medikamentojn, kiujn ni prenas ĉiutage.

Simple ni estas malsamaj, ni daŭras pli longe. Oni diras, ke tiuj homoj, kiuj vivas en tiuj rezervejoj, ne estas plu multaj, sed iun tagon mi venis al tiu ĉi viro, bibliotekisto, serĉante libron, kiel ĉiam kaj li diris al mi: "Filo, mi iras... Mi ne planas vivi ĉi tie kaj morti en tiu ĉi mondo. Mi iras al unu el tiuj rezervejoj."

Unu homo povis iri tien, sed li ne povis plu reveni. Mi demandis: "Sed kion mi faros nun? Kiel mi legos tiujn librojn?" Li diris: "Mi kunportos al vi unu libron, kiu havas ĉiujn respondojn je viaj demandoj."

Li alportis al mi unu grandan dikan libron kun ledaj ligiloj, sur kiuj staris: "Biblio".

Li estis feliĉa, ĉar li foriris al rezervejo kaj ke li ne revenos. Mi ne komprenis lin. Mi prenis tiun ĉi libron kaj mi legis ĝin kun mia tuta animo. Kiam mi estis en mia laborejo, mi ne povis atendi por reveni hejmen, por daŭrigi legadon. Ili ordonis al ni, ke ni laboru multe pli kaj diris, ke tio estas pli bone por ni, ke ni havu pli malmulte da libera tempo. Mi pripensis nur pri tiu ĉi libro kaj pri tio, kion mi tralegis. Tiu viro diris al mi, ke en tiu ĉi libro estas kantoj, historio, profetaj skribaĵoj, futuro, profundaj respondoj pri la vivo kaj viv-demandoj. Respondoj pri ĉio, kio ĝenas kaj turmentas la homon. Ĉiufoje, kiam mi

11.04. – 18.04.22: PSI (Printempa Semajno Internacia) en Braunschweig (naskiĝurbo de GEA)

17.06. – 19.06.22: Esperanto-Wochenendkurse in Herzberg am Harz (Esperanto-Centro)

29.07. - 14.08.22: Esperanto-Sommerkurse beim Esperanto-Centro Herzberg

30.09. - 03.10.22: Torpedo (das traditionelle AGEI- + DEB-Weiterbildungsseminar)

Ekde majo 2022 dum la semajnfinoj: Informbudoj per nia Esperanto-aŭto, kune kun surlokaj Esperanto-geamikoj laŭ interkonsento (en ĉirkaŭaĵo ĝis 130 km de Herzberg), ekz. ĉe kulturtagoj kaj urbaj festoj.

legis, mi lernis ion novan. Kiam la libro alproksimiĝis al la fino, mi ploris. Mi deziris daŭrigi la legadon. Mi komencis denove de la komenco kaj mi denove lernis ion novan.

Mi tralegis tiun ĉi libron kelkajn fojojn. Mi subite sentis min proksima al tiu ĉi viro, kiu nomiĝas Filo de Dio, de nomo Jesuo Kristo. Mi provis trovi tiun ĉi personon en la serĉ-maŝino, sed tiu ĉi moderna aparato rifuzis doni al mi la informojn.

Ĉi tie staris, ke tiu ĉi persono trompis la plej multajn homojn kaj pro li, plej multaj militoj estis batalitaj, plej multaj homoj mortis, ktp.

Se temas pri religiaj militoj, tio estas unu granda mensogo kaj trompo. Antaŭ multaj jaroj estis kutimo organizi ekleziajn mesojn. Multaj klanoj en la mondo, precipe la balkana klando, havas la lastajn preĝejojn. En tiuj rezervejoj, kie oni organizas ekleziajn mesojn, homoj ricevas konsekran manĝaĵon per unu kulereto el unu plado. Estas terure, kiom da virusoj ĉi tie estas. Multaj homoj eĉ pensas, ke la viruso estis koncipita tie. Almenaŭ tion oni diris tie. Mi provis trovi tiujn, kiuj estis tie en la nomo de Jesuo.

Estis multaj el ili, kaj ĉiuj diris, ke ili venas en la nomo de Jesuo, sed ĉiuj el ili serĉis ian kontenton en mono. Mi diras mono, ĉar tio estas mono ĉe vi, ĉe ni oni nomas tion "kreditoj."

Mi memoras pri unu nokto, kiam mi legis la sanktan skribon. Temis pri la sinjoro, kiu preĝas en la ĝardeno kaj ankaŭ mi sentis la bezonon preĝi. Mi komencis tiel: "Dio, oni diras, ke vi nomiĝas tiel. Mi vokas vin nun, ĉar mi bezonas vin. Mi ne scias la kialon de mia vivo. Kial mi vivas kaj kio estas la esenco de mia vivo? Mi estas konfuzita kaj perdita. Ĉu ĉi tio estas ĉio por kio mi estas kreita? Esti ies laborforto, kiu volas, ke mi daŭru por ekspluati min pli longe? Mi volas vivi kaj scii, kial mi vivas. Mi petas vin, helpu al mi. Estis mia preĝo, kiu finiĝis malglore. La alarmo eksonis kaj tiu virtuala flegistino aperis antaŭ mi kaj demandis min: "Kie estas la problemoj?" Mi diris, ke mi ne havas problemojn, sed ŝi diris: "Vi vokis helpon." Vi diris: "Mi petas vin, helpu al mi." Ĉu vi havas dolorojn? Mi diris, ke mi ne havas dolorojn. Mi nur diris tiel.

– Ĉu vi estas libera? Ĉu estas iu kun vi en la ĉambro? Ĉu vi deziras ke ni voku policanojn? Kapjesu, se vi ne povas paroli.

– Mi povas paroli kaj ĉio estas en ordo.

– Ĉu vi estas certa? Kial do vi vokis helpon?

– Mi vundis mian fingron kaj mia fingro doloris, kaj tial mi diris tion, sed nun ĉio estas en ordo. Ĝi ne doloras plu.

– La ambulanca teamo estis sendita al via adreso. Ĝi estos ĉi tie tre baldaŭ.

– Ne necesas sendi ion ajn! Tamen, ŝi ne aŭskultis min. Tiuj ĉi eniris tuj. Mia saĝa domo malfermis la pordon por ili. Vi eĉ ne povas malpermesi al ili fari tion. Ili rajtas eniri kiam ajn ili volas. Ili eniris por rigardi/esplori mian fingron. Mi montris kaj diris, ke unu el miaj fingroj doloras. Tamen, oni movis la fingron tien kaj reen kaj trovis nenion. Ili faris rentgenradiadon kaj konstatis, ke ĉio estis en ordo. Ili demandis, ĉu mi vere vundis mian fingron, kie mi faris tion, kiel okazis tio, ktp.

Diablen! Tio estis la tuta esploro. Fine mi diris: "Homoj, mi ne vundis mian fingron!" Mi diris nur tiel. Tiel mi sentis. Poste ili faris rendevuon ĉe psikologo por mi, kaj mi devis iri tien. Mi tre malfacile travivis tion. Poste mi devis plenigi demandarojn ĉe la laboro. Ĉu mi estas kontenta kun mia laboro, ktp.

Nur pro tio, ĉar mi volis preĝi al Dio. Ni estas tre bone konektitaj. Ili povas legi viajn pensojn, kaj se vi diras, ke vi bezonas helpon, ili estas tuj ĉe vi. Tiam ĝi ĝenis min, ĉar mi ne sciis, ke ĝi estas tiel strikta.

Tamen mi aŭdis de unu viro, ke estas kelkaj lokoj sur la planedo tero, al kiuj homo povas iri, kie ne estas signalo kaj kie homo povas diri kion ajn li volas kaj ĉion, kio estas en lia menso.

Mi bezonis longan tempon por kolekti mian kuraĝon, sed iam mi faris tion. Mi ne povis plu elteni kaj kolekti ĉion en mi. Mi vokis taksion, nian taksion.

Vi iam havis aviadilojn, ni nun havas taksojn, kiuj alportas nin kien ni volas sur la planedo tero. Ni ne havas limojn, nun estas ĉio unuiĝinta, ĉiuj landoj. La takso kondukis min tien.

Originala titolo: *Prica o putovanju kroz vreme*
de Patro Predrag Popovic. Esperantigis Franziska Dodik
2021-11-14

El Graz kaj Vieno al Londono

Kiam mi komencis Esperantan kurson per Duolingo en decembro 2020 en Vieno, dum la dua lokdaŭno¹, mi neniam pensis, ke preskaŭ unu jaron poste mi estus en Londono, verkante kontribuon por la venonta eldono de E-aktuell.

Sed ni komencu je la komenco: Mia unua kontakto kun la internacia lingvo estis antaŭ kelkaj jaroj, mi ankoraŭ loĝis en *Graz*² (mi moviĝis al internulejo en Vieno en 2017), lernis kelkajn vortojn kaj vizitis foje la bonegan vianan Esperanto-Muzeon. Sed mi ne vere okupiĝis pri Esperanto. Antaŭ ĉirkaŭ unu jaro, mi fakte startis lerni ĝin, mi esploris la lingvon interrete kaj komencis retkurson per Duolingo. Samtempe mi ankaŭ organizis klubon en mia gimnazio „Sir Karl Popper Schule“, por gestudentoj, kiuj interesiĝas pri historio, politiko kaj lingvoj – nomata „History Club“ (Histori-klubo). Sed dum la lokdaŭnoj ni planis retkunvenojn kaj retdiskutojn per „Zoom“ kun fakuloj pri diversaj temoj. Por evento pri Esperanto, mi skribis al Aŭstria Esperanto-Federacio kaj kune ni organizis intereseĝan retdiskuton je la 15-a de januaro, kun la reprezentanto de UEA ĉe UN en Vieno, prof. Hans Michael Maitzen (pri ĝi ni jam raportis en E-aktuell). Kun tiu kontakto la konstanta interŝanĝo kun la aŭstria esperantistoj komenciĝis, kio tre instigis min dum mia lernado de Esperanto.

Ĉio tio okazis dum mia abiturienta jaro en Vieno. Paralele al mia lasta lerneja jaro mi lernis la Internacian



Felix Baur

lingvon – per Duolingo, Esperantaj libroj kaj la bonega subteno de AEF, precipe tiu de Hans Michael „Miĉjo“ Maitzen.

Nun mi ankoraŭ ne estas studento en universitato, mi pasigas t.n. „Gap Year“ (inter-jaro) en organizo, kiu nomiĝas „Gedenkdienst“ (memorservo). Tio estas programo, kiu sendas ĝejunulojn eksterlanden, ekzemple al Usono, Germanio, Pollando, Israelo ktp., por labori dum unu jaro en muzeoj, institucioj kaj monumentoj de la holokaŭsto, por okazigi memoreventojn pri ĝi (trovu pli da informoj per www.gedenkdienst.at). Tiu servo ankaŭ povas validi kiel civilservo, kiu estas deviga, same kiel la soldatservo alternative, por la plimulto de junuloj en Aŭstrio (sed mi faras ĝin libervole, ĉar mi ne estas devigita al unu de tiuj servoj). Mi havas la honoron, ke mi povas fari mian memorservon ĉi tie en Londono, ekde oktobro, ĉe „Holocaust Memorial Day Trust“. Ĝi estas grava oficiala komun-utila fondaĵo, kiu organizas ĉiujare „Holocaust Memorial Day“ (Holokaŭsta memortago) la 27-an de januaro kaj multon pli. Tie mi ekzemple verkas historiajn aŭ politikajn esplorojn, faras administrajn laborojn, aŭ helpas pri la komunikado de la organizo.

Antaŭ tri semajnoj mi povis reprezenti Gedenkdienst ĉe evento en la aŭstria ambasadejo, kie posteuloj de tiuj, kiuj estis forpelitaj el Aŭstrio dum la nazia epoko, ricevis la aŭstrian civitanecon. Krome tie mi renkontis la aŭstrian ambasadoron en Londono D-ron Michael Zimmermann (vidu la apudan foton).

Apud mia laboro en Londono mi kompreneble daŭre restas en kontakto kun AEF kaj okupiĝas pri Esperanto. Tial mi ankaŭ skribis al Londona Esperanto-Klubo (LEK) kaj jam ĉeestis unu eventon – retparoladon pri scienca temo. La Londona klubo ankoraŭ renkontiĝas



Felix Baur kun la aŭstria ambasadoro en Londono D-ro Michael Zimmermann

interrete, ekde novembro ankaŭ persone, unufoje monate.

Mi tre antaŭĝojas pri mia plua tempo ĉi tie en Londono, interesaj momentoj en mia laboro kaj mia plia lernado de Esperanto!

Felix „Felikso“ Baur

Esperanto en Graz-a studenta medio dum la 60-aj jaroj

En la jaro 1958 je Pentekosto (la 25-a de majo) mi partoprenis en kampado de la Graz-a KMJ (Katolika Mezlerneja Junularo), kiu inkludis grimpan marŝadon al la monto *Patscha*, najbara al la orientstiria urbo *Weiz*.

Dum la sufiĉe longa migrado okazis nature multa babilado kaj ŝercado inter la junuloj. Restis en mia memoro, mi tiam frekventis la 5-an klason de la Akademia Gimnazio *Graz* de humanisma instruado (i.a. 8 jaroj de la latina lingvo), unua kontakto kun Esperanto pere de Klaus Perko, kiu tiam estis en la 7-a klaso de realgimnazio. Survoje al la *Patscha*-pinto li donis al mi kaj alia kunmarŝanto lingvajn ekzemplojn de tiu planlingvo. „Ŝmiri buterpanon“ restis en mia memoro kaj tiam tio ne kreis bonan impreson pri tiu lingvo en mi.

Alia memorajo estas la opiniesprimo de mia latin-profesoro Ernst Doblhofer, kiu iam tuŝis Esperanton en sia instruado, dirante, ke Esperanto estas io por simplaj homoj, laboristoj kaj similaj. Tiu klasifiko de eminenta profesoro, poste eĉ de la Universitato de Kiel (Germanio), postlasis en mia subkonscio provokan memorajon.

Ĝi reaperis kiam mi en oktobro 1961 komencis la studadon de matematiko kaj fiziko en Karl-Franzens-Universitato de *Graz*. En tiu monato okazis bonveniga kaj konatiga vespero por ekstudentoj en la domo de la katolika altlerneja komunumo. Mi sekvis la koncernan inviton, por ekkoni la atmosferon tie. Tute nature tie estis apenaŭ iu, kiun mi jam konis de la gimnazia tempo, sed jen mi ekvidis Klaus Perko kaj salutis lin amike, memorante ankaŭ lian scion de Esperanto, pro liaj informoj siatempe dum la pentekosta migrado. „Ĉu vi daŭre okupiĝas pri Esperanto?“

– mi demandis lin kaj li jesis. En tiu momento okazis en mi kvazaŭ eksploda decido fari en mia nova vivofazo ion eksterordinaran, kaj do mi demandis lin, ĉu li pretus doni al mi kaj al kelkaj studkolegoj Esperanto-kurson. Li akceptis kaj sammonate ni komencis tiun kurson en la sama domo (*Graz* 3, Leechgasse 24)! Niaj lingvaj progresoj en Esperanto estis grandiozaj, Klaus Perko,

kiu ekstudis juron en la sama universitato jaron antaŭ ni, havis apartan legajon, kiu fariĝis kutima en niaj interparoloj: temas pri lia traduko de Samuel Beckett: *Atendante je Godot!* Tie aperis la frazo-sekvo: „Iru ni! - „Ni ne povas!“ - „Kial ne?“ - „Ni atendas je Godot!“ - „Ho jes, vi pravas!“ Mi ne plu scias, kiom ofte ni uzis tion inter ni, anoj de la studenta E-klubo....

Niaj progresoj estis tiel mirindaj, ke tri el ni, do ankaŭ Georg Klingenberg kaj Peter Peltzer, partoprenis subtene de la *Graz*-a E-societo „Unueco“ en internacia junulara E-renkonto somere de 1962, en la turisma vilaĝo EUR (Ekspozicio Universala de Romo) en la sudo de la itala ĉefurbo. Ĝi kunigis ĝejunulojn, kiuj antaŭ nur unu jaro eklernis Esperanton.

Eĉ referaĵon pri la aŭstria popolaltlerneja sistemo mi sukcesis prezenti tie!

Skribu al *medienecho@esperanto.de* (koncernas: Heroldo)



27. Oktober 2021

Harz-Kurier – mit Bezahl-Schranke
Esperanto-Café Herzberg
Zwei Botschafter zu Gast
<https://www.harzkurier.de/lokales/herzberg/article233690619/Esperanto-Cafe-Herzberg-zwei-Botschafter-zu-Gast.html>

22. Oktober 2021
Magdeburger-News.de
Esperanto lernen

Zwischen dem 28. Dezember 2021 und dem 4. Januar 2022 findet in der Lutherstadt Wittenberg eine Esperanto-Woche statt. Wer schon immer mal die internationale Sprache Esperanto (kennen)lernen wollte, hat mit dem Verein MagdeDorf die Gelegenheit.
<https://www.magdeburger-news.de/?c=20211028143638>



21. Oktober 2021

GfDS, Gesellschaft für deutsche Sprache e.V.
über Esperanto: La sola lingvo, kiun ĉiu komprenas
In der Zeitschrift 'Der Sprachdienst' 5/21, Jg. 64, Sept/Okt, S.187, ist eine Buchbesprechung zu 'Die seltsamsten Sprachen der Welt' von Harald

Haarmann' abgedruckt, die mit 'Esperanto' endet. Nachlesen kann man den Beitrag auf der Internetseite *<https://gfdS.de/harald-haarmann-die-seltsamsten-sprachen-der-welt/>* vgl. auch *https://www.buecher.de/shop/sprache/die-seltsamsten-sprachen-der-welt/haarmann-harald/products_products/detail/prod_id/60392213/*



21. Oktober 2021
Main-Post
Lauda-Königshofen

Sammelstücke übergeben: Pfarrer aus Oberlauda erfand Weltsprache
Eine Schenkung mit Exponaten von und über den Volapük-Erfinder Johann Martin Schleyer aus Oberlauda hat die Stadt Lauda-Königshofen erhalten.

Zu Beginn des 20. Jahrhunderts begann der Siegeszug des 1887 veröffentlichten Esperanto, das einige Volapük-Strukturen übernimmt. Schleyer arbeitet unverdrossen weiter an seinem Volapük-Wörterbuch, zuletzt umfasst es über 100 000 Wörter. Am 16. August 1912 stirbt er in Konstanz und wird auf dem dortigen Hauptfriedhof begraben.
<https://www.mainpost.de/regional/main-tauber/sammelstuecke-uebergeben-pfarrer-aus-oberlauda-erfand-weltsprache-art-10676350>

13. Oktober 2021

Harz-Kurier – mit Bezahl-Schranke
Ehrengast aus Japan besucht Esperantozentrum Herzberg
Eine Esperanto-Tagung mit internationalen Teilnehmern fand in Herzberg statt.
<https://www.harzkurier.de/lokales/herzberg/article233567955/Ehrengast-aus-Japan-besucht-Esperanto-Zentrum-in-Herzberg.html>



13. Oktober 2021

La aŭstralia Esperanta retradio
La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ 5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.
<http://esperantaretradio.blogspot.com/?view=magazine>

12. Oktober 2021

VHS Hameln-Pyrmont
Esperantoluft schnuppern
Einführung in die internationale Sprache: Termin 12. Januar 2022
https://www.vhs-hamel-pyrmont.de/_kufer/webbasys/index.php?katha



[upt=1&katid=49&katvaterid=4&katname=Esperanto&letter=Z%22+title](https://www.esperanto-buecher.de/epages/82996652.mobile/de-DE/?ObjectPath=/Shops/82996652/Products/L3143)

11. Oktober 2021

Esperanto-Buecher.de
Esperanto por mi, vol. 3
16 esperantistoj portretitaj de Helga Plötner
<https://www.esperanto-buecher.de/epages/82996652.mobile/de-DE/?ObjectPath=/Shops/82996652/Products/L3143>



7. Oktober 2021

Eventa Servo
am 18. Dezember in Wien:
Einstündiger Schnupperkurs. Für alle, die noch keine Esperanto-Kenntnisse haben.
<https://eventaservo.org/e/99341f>

27. September 2021

Poezio.net
Die Loreley
http://www.poezio.net/version?poem-id=2&version-id=587,2,1115&order=language_id
Dazu ein Video, oben auf der Loreley:
<https://www.youtube.com/watch?v=JdH07MzPJ3A>



27. September 2021

Radio Dreyeckland
Esperanto-Magazin
<https://player.fm/series/radio-dreyeckland-180742/esperanto-magazin-montag-27092021>



9. September 2021
Harz-Kurier – mit Bezahl-Schranke
Informationstafel auf Esperanto auf dem Großen Knollen

Das wetterfeste Schild informiert die Besucher der Baude über den Berg, die Natur vor Ort und den Aussichtsturm mit dem Restaurant.

<https://www.harzkurier.de/lokales/herzberg/article233359381/Informationstafel-in-Esperanto-auf-dem-Grossen-Knollen.html>

7. September 2021

herzberg.de

Esperanto verbindet Menschen auf der ganzen Welt

Aus der Jahreshauptversammlung der Esperantogesellschaft Südharz
<https://www.herzberg.de/portal/pressemitteilungen/uebersicht-900001789-25580.html?rubrik=900000025>



Piede tra Palatinato: la 9-a Esperanto-Migrado Aŭtuna (EMA)

Pasintjare en Hitzacker kun la tiamaj pandemiaj reguloj estis 15 partoprenantoj, ĉi-jare en Neustadt (Weinstraße), kun iom malpli striktaj limigoj, estis 19.

Versajne nia aŭtuna migrado profitas de la sezono, en kiu la nombro de kronvirusaj infektiĝoj malaltiĝas. La migradon denove organizis kaj gvidis Gerald Roemer kaj Mariko Aoshima, kaj per la plej moderna satelita tekniko asistis Stefan Krieghoff. La regiono laŭlonge de la vinstrato estas ne nur aparte vidinda, sed ankaŭ bonege preparita por turismado. La junulargastejo en Neustadt situas centre kaj havas propran vinkelon. Ĉiujn elirpunktojn eblis facile atingi per fervojo aŭ publikaj aŭtobusoj. Pri la vojmontriloj laŭlonge de la arbaraj vojetoj kaj pri la kabanoj sur la montopintoj zorgas Pfälzerwald-Verein.

La loko do estis bone elektita. Tamen Gerald antaŭe prave atentigis, ke oni kapablu iri distancon de ĉ. 15 km (foje estis 20) kun altodiferencoj ĝis 500 metroj. Sed post streĉaj tagoj sekvis iom malpli streĉaj. Ni komencis per vespera urbopromenado en Neustadt, sub gvido de Jürgen Hammann kaj Thomas Frübis. La postan tagon sekvis migrado al la kastelo de Hambach (unu el la naskiĝlokoj de demokratio en Germanio) kaj la monto „Hohe Loog“ super Neustadt. Pli facila estis la marda programo: migrado tra

la vitejoj de Deidesheim al Bad Dürkheim. Merkredon ni migris trans montojn kaj tra arbaroj al la kastelo Neidenfels, Lambertskreuz kaj la draka kaverno. Ĵaŭdon sekvis pli facila etapo kun migrado de Neustadt preter la monto Kalmit al la vinloko St. Martin, kie la programo finiĝis per gustumado de bio-vinoj. Kiel kutime, vendredo estis rezervita por la revojaĝo.

Estas rimarkinde, ke post kelkara interrompo ni sukcesis revivigi la tradicion de aŭtunaj migradoj tra belaj regionoj de Germanio. Ankaŭ por 2022 jam ekzistas konkreta plano: La Teutoburger Wald ĉirkaŭ Detmold. Dankon meritas precipe Gerald Roemer, la ĉefa organizanto. Sufiĉe da intereso ekzistas: por migrado 15-20 partoprenantoj estas bona nombro. Ankaŭ ĉi-jare bedaŭrinde partoprenis nur personoj loĝantaj en Germanio – ĉu pro la kronvirusaj limigoj, ĉu simple pro la distancoj. Eble ankaŭ la tradicio de komunaj migradoj estas malpli konata eksterlande. Sed oni ne krokodilis...

Venontan oktobron do en Detmold kaj ĉirkaŭaĵo, espereble kun bona vetero kaj sen virusoj!

Ulrich Brandenburg.

30. Juli 2020

Galileo TV, kurzes Video über Die Sprache der Menschheit: Esperanto

Der Schlüssel zum Weltfrieden - das sollte Esperanto sein. Wir schauen uns die Plansprache mal genauer an. 2:40 min.

<https://www.galileo.tv/video/sprache-der-menschheit-esperanto/>



18-a Rata Rendevuo en Porta Westfalica kaj Bückeburg

Jam la 18-an fojon la Esperanto-grupo Hamelno invitis amikojn de la internacia planlingvo al la Rata Rendevuo.

Ĉi-foje oni renkontis unu la aliajn en Porta Westfalica kaj Bückeburg. Por kelkaj ĝi estis la unua surloka kunveno post la komenco de la pandemio kaj estis granda ĝojo finfine revidi la aliajn persone. Venis ne nur homoj el la proksimeco, sed ankaŭ el Hamburgo, Bremeno, Kassel, Marburgo, Duisburg, ktp.

Ĉe belega vetero oni renkontiĝis antaŭtagmeze sur la parkejo de la Imperiestro-Vilhelmo-monumento sur la Wittekind-monto. Du ĉiĉeroninoj montris al ni la monumenton de Imperiestro Vilhelmo kaj fosis en la historio, klarigis al ni la ekeston kaj gravecon de ĉi tiu impresa konstruaĵo, kiu en la jaro 1896 pompe estis inaŭgurita. Sed same kiel la monumenton la partoprenantoj ĝuis la belegan panoramon kaj la vastan elrigardon, kiun ofertis la loko tiom supre. Ankaŭ dum la bongusta tagmanĝo en la restoracio „Wilhelm 1896“ ni povis lasi rigardi niajn okulojn en la malproksimecon kaj samtempe intense babilis kun niaj ĉetablaj najbaroj, por interŝanĝi spertojn kaj travivaĵojn.

Poste ni veturis peraŭte al la heikoptera muzeo en Bückeburg. Dum tre informriĉa, instrua ĉiĉeronado, spicita per multaj anekdotoj, la tempo pasis kiel dum „flugo“. Ĉiuj eksciis novaĵojn kaj estis ebleco mem eksidi en helikoptero.



Sperte kaj amuze la ĉiĉerono klarigas la helikopterajn.

Ni ankaŭ povis admiri la plej novan eksponaĵon, la lastan transportan helikopteron de la tipo Bell UH-1D. Ekde 1967 ĝi flugis preskaŭ ĉie kaj oni ankaŭ nomis ĝin „tapiŝfrapilo“, pro la frapanta sono. Tiel la lasta helikoptero de tiu tipo kun la kodnumero 73+08 ricevis belegan apartan lakajon „Goodbye Huey“ kaj flugis en junio 2021 sian lastan flugon al Bückeburg, estis solene sendeĵorigata kaj poste per helpo de la THW (teknika help-organizaĵo) enmetita en la muzeon.

Fine la partoprenantoj vizitis ankoraŭ glaciaĵojn. Ĉe kafo kaj glaciaĵo oni parolis pri la planoj por la venonta jaro. Multaj volas partopreni la Germanan Esperanto-Kongreson en Oldenburg. Kelkaj ŝatas vojaĝi al kongresoj en Italio, Litovio, Kanado, Senegalio, ktp. Sed daŭre ja okazas ankaŭ la virtualaj kunvenoj preskaŭ ĉie en la mondo. Ankaŭ partoprenis jam esperantistoj el pli ol 40 landoj al la virtualaj kunvenoj de la Ratkaptista Bando ĉi-jare. Rigardu mem en la kalendaron de Eventa Servo por vidi la multajn eblecojn renkonti esperantistojn rete: <https://eventaservo.org>.

En oktobro ankaŭ komenciĝos denove Reta Esperanto-Kurso por germanlingvaj komencantoj. Pliaj informoj troveblas sur la retpaĝo <https://www.esperanto.de/hameln> aŭ ĉe **Heinz W. Sprick**, tel. 0162-7536396.



La grupo sur la monumento: La Imperiestro-Vilhelmo-Monumento ofertas belegan panoramon.

Postrikolto pri okazinta TRAKO 2021

Germana-Pola kaj Fervojista Esperanto-Kongreso (TRAKO), kiu estis planita por Pentekosto 2020 en Frankfurt (Oder) kaj Słubice, estis prokrastita kaj nur realigita virtuale dum Pentekosto 2021 (05-21/24).

Sed en tiu ĉi kongreso povis partopreni ĉirkaŭ 350 Esperanto-amikoj el la tuta mondo. Tamen mankis rilatoj al la gastiganta urbo kaj la ofte interesaj kaj instruantaj ekskursoj, individuaj konsiladoj kaj rigardado en la okulojn. Mankis koncertoj kun eblaj dancinterludoj, same kiel manĝado komuna kaj foliumado en la libroservo. Sed la partoprenintoj ŝparis la ofte streĉajn, multekostajn longajn vojaĝojn kaj transportadon de valizoj. Kompreneble, ankaŭ estis pozitiva, ke partopreno estis senpaga kaj oni nur devis ensaluti per la Zoom-aliro post ricevo de la pasvorto.

Tamen temis pri tre varia kaj riĉa programo kun plej diversaj facetoj. Ofte malfacilis elekti inter tri samtempe okazintaj programeroj. Necesis elekti antaŭ la aliro, sed kiam iu finfine tamen intencis ŝanĝi la „salonon“, ĉiu ricevis bonan helpon de la administrantoj de la Zoom-portalo, kiun disponigis GEA.

Ne mankis la kutimaj salutvortoj de la organizintoj de la kongreso kaj de diversaj aŭtoritatoj de Germanio (ambasadoro en Pollando d-ro Arndt Freytag von Loringhoven), Pollando (ambasadoro Prof. d-ro Andrzej Przyłębski), Brandenburgio (ĉefministro d-ro Dietmar Woidke); Frankfurt (Oder) (ĉefurbestro René Wilke), FISAIC (adjunkta ĝenerala prezidanto Kurt Neuwirth), GEA (prezidanto Ulrich Brandenburg), PEA (prezidanto Robert Kamiński), IFEF (prezidantino psik. Rodica Todor).

Prof. Goro Kimura el Tokio prezentis elokvente kaj detale la rilatojn de la german-pola limregiono, respegulinte la lingvajn aspektojn. Tiu centra prelego ankaŭ emfazis la titolon de la kongreso, kiu estis „Najbaroj“. Per Zoom la tuta mondo fariĝis regiono de najbaroj. Partoprenis Esperanto-amikoj ne nur el Germanio kaj Pollando, sed ankaŭ el Afriko, Azio kaj Ameriko. Kio ja eblis ankaŭ dum aliaj virtualaj kongresoj kaj aranĝoj, pri kiuj estis varbite tutmonde. Sed ankaŭ multaj aliaj prelegoj okazis



pri la plej diversaj temoj, i.a. prelegis Zofia Śmistek pri la renkontiĝo de Mazowiecki (PL) kaj Kohl (D), Ralf Fröhlich pri la Esperanto-Stacio Halbe, Seán Ó Riain pri najbaraj rilatoj sur la irlanda insulo, Irek Bobrzak pri la projektoj Varsovia Vento kaj botanika terminaro, Chuck Smith pri Amikumu, Ulrich Lins pri la historio de rilatoj inter polaj kaj germanaj esperantistoj, Katarzyna Lewończuk pri Białystok-aj Esperanto-libroj, Roman Dobrzyński pri la opero Halka kaj okazis neforgesebla virtuala promeno tra Berlino kun Fritz Wollenberg. Forumon pri Duolingo sperte gvidis Michael Vrazitulis. Ene de SUS (Sanmarineca Universitata Sesio) estis prezentitaj prelegoj de Amri Wandel pri Nigraj Truoj, de d-rino Ida Stria pri la nord ĝermanaj lingvoj kaj de Anna Striganova kun la temo Fabeloj pri li, fabeloj pri ŝi. Eĉ mallonga kontribuo pri la urboj Frankfurt ĉe Odro kaj Słubice ne mankis. Por la fervojistoj samtempe okazis pluraj fakaj prelegoj pri fervojaj temoj, ekz. Jan Niemann prelegis pri akcidentoj kaj epizodoj - poŝttagoj kaj duonremorkoj, Chielismo WANG Tianyi pri komercaj ŝancoj de ĉinaj lokomotivoj, Guido Brandenburg pri rega kaj sekuriga tekniko por regionaj linioj kaj pri german-polaj limtranspaŝaj fervojaj projektoj, por mencii nur kelkajn el la riĉa faka programaro.

Per la retadreso: <https://www.youtube.com/channel/UC0vVPGHLSQcaH7Q2mjQc-tA/videos> vi denove povas ĝui kelkajn prelegojn.

Tre allogaj estis la ĉiuvespere ofertitaj koncertoj, kiel la flutkoncerto de Marek Nahajowski, diversaj kanzonoj de Jerzy Handzlik, sed ankaŭ koncertoj de ĴeLe, Chiara Raggi, Frey-Lech Trio, JoMo, certe ne forgesebla ankaŭ la koncerto de Jonny M. Kelkaj artistoj sendis videon kaj ekz. Chiara prezentis sian koncerton rekte antaŭ kamerao. Ĉiu koncerto estis aparta evento. Ili ankaŭ okazis sen gravaj eraroj. Mi nur ne certas, ĉu la artistoj ankaŭ aŭdis la virtualan aplaŭdodon.

Dum la preparado de la kongreso ni havis multajn rilatojn al diversaj organizoj, por okazigi ĝin laŭ la kutima maniero. Ni klopodis doni bonan bildon pri Esperanto kaj la diversaj eblecoj de aplikado. Estis preparitaj belaj ekskursoj, ne nur por la fervojistoj, kiuj kutime pli longe krongesas, sed ankaŭ por la partoprenantoj de la German-Pola-Kongreso.

Ni tamen tre ĝojas, ke la german-pola fonduso subtenis nin per sufiĉe granda sumo, ke eĉ pageblis honorarioj al multaj artistoj kaj prelegintoj.

Kiajn spertojn havas vi rilate al virtualo TRAKO kaj similaj eventoj? – Reagojn bv. sendi al la redakcio de “Esperanto aktuell”!

Ronaldo
(Ronald Schindler, Frankfurt (Oder))

Ein keksiges Wochenende

Meriko

Es war also so weit: das KEKSO stand vor der Tür; ein schönes Wochenende voller neuer Eindrücke, Erfahrungen und netter Menschen. Also packte ich am Freitag meine sieben Sachen und machte mich auf den Weg nach Schwerte.

Als ich ankam, waren gerade einige noch Essen und Dinge zum Kochen kaufen, weil wir uns selbst versorgt hatten, und so aß ich Kuchen, unterhielt mich mit anderen die zurückgeblieben waren und hörte ihren Gesprächen zu. Als der Trupp vom Einkaufen zurückkehrte, ging es ans Kochen – es gab Reis mit Curry. Es folgte das Abwaschen und nach einer kleinen Pause ging es zur Kennlernrunde. Unsere Aufgabe war es, mit je ein bis zwei anderen Leuten unsere Gemeinsamkeiten und Unterschiede festzustellen. Nach der Vorstellung der Resultate hatten wir so einen schönen Überblick über die bunte Truppe.

Am Abend spielten wir noch etwas UNO und während die einen sich gegen 23:00 Uhr auf den Weg ins Bett machten, waren die anderen noch bis 02:00 Uhr des nächsten Morgens munter.

Der Samstag begann ruhig, weil zunächst nur drei Leute wach waren. Wir bereiteten daher schon einmal das Frühstück vor, und haben dann selbst gemütlich gegessen. Im Laufe des Morgens kamen nach und nach weitere aus den Zimmern zum Frühstück, sodass wir irgendwann wieder alle beisammen waren. Auf dem Programmplan stand als nächstes eine Aufteilung der Gruppen. Die einen nahmen an einer Diskussionsrunde teil und die anderen an einem Esperantokurs; zur zweiten Gruppe gehörte ich. Wir gingen also einen kleinen Kurs durch und sprachen dabei überraschend viel. Zudem war der Kurs auf Esperanto, so dass man auch unweigerlich direkt die Sprache gehört hat und so



Gruppenfoto vor dem Naturfreundehaus Schwerte.




Esperanto-Kurs beim KEKSO

direkt das Verstehen üben konnte. Unbemerkt wurde währenddessen das Mittagessen gekocht, weshalb wir nach dem Kurs, und die anderen nach ihrer Diskussionsrunde, ein erneut sehr leckeres Mittagessen auf dem Tisch hatten; diesmal waren es Spaghetti.

Nach dem Essen soll man sich ja bekanntlich etwas bewegen und genau das taten wir auch. Wir spazierten also für ungefähr zwei Stunden durch den Wald, genossen die Natur, sprachen über diverse Dinge- die Zeit verging schneller als gedacht. Als wir wieder zurückkamen stand ein Kalligrafie-Workshop auf der Agenda. Zunächst konnte ich mir nicht wirklich vorstellen, was es damit auf sich hat, jedoch wurde es dann doch schnell deutlich: Für den KEK der DEJ/GEJ wurde eine schöne neue Aufmachung gestaltet. Diese beinhaltet unter anderem auch eine Sammlung, bestehend aus diversen Varianten des Buchstabens „E“. Und unsere Aufgabe, oder eher gesagt unsere Freude, war es dann ebenfalls ein „E“ zu schreiben, um so die Diversität und Gemeinschaft der Kultur Esperantos im KEK auszudrücken. Wir hatten also diverse Schreibutensilien, von einfachen Stiften, über Federn, bis hin zu Pinseln und konnten so kreativ werden.



Workshop zum *Thema Werbung* für Esperanto.



Meriko.

Am Abend haben wir dann erneut zusammen gekocht und so leckeren Couscous gegessen. Anders als am Abend zuvor stand kein Abendprogramm an, jedoch wurde uns nicht langweilig. Die einen spielten UNO, die anderen redeten miteinander, und wieder andere spielten „Kartoj kontraŭ Esperantujo“ („Cards Against Humanity“ heißt das originale Spiel). Wie auch am Tag zuvor entschlossen sich einige früher schlafen zu gehen als andere, und so endete auch der Samstag.

Am Sonntagmorgen frühstückten wir, diesmal mit mehr Leuten, sodass der Frühstückstisch etwas belebter war als am Tag zuvor. Es fand erneut eine Aufteilung der Gruppen statt, wie auch schon Samstag. Die eine hatte erneut eine Diskussionsrunde und die andere den Esperantokurs. Am Ende des Kurses haben wir noch alle Lektionen ausgeteilt bekommen, um so noch weiter üben zu können.

Damit war das Wochenende auch schon wieder vorbei. Wir packten unsere Sachen, räumten auf und der Abschied folgte. Alles in allem war das Wochenende sehr schön. Ich habe viel gelernt, neue Leute kenne gelernt, Esperanto gesprochen und vor allem viel Spaß gehabt. Danke und bis bald!



Infostand *in der Innenstadt*.

Pri mia volontula jaro

Paula

De septembro 2020 ĝis aŭgusto 2021 mi faris volontulan jaron pri heredaĵ-prizorgado. Ekzistas multe da diversaj ebloj fari volontulajn jarojn.

Dum volontula jaro oni laboras en unu laborejo, ofte temas pri publikaj institucioj aŭ asocioj, kiel malsanulejoj, infangardenoj, lernejoj, kulturaj centroj, muzeoj, politikaj asocioj, partiaj oficejoj, metiejoj kaj multe da aliaj. Ankaŭ internaciaj volontulaj jaroj eblas, eĉ volontulaj jaroj en Esperantujo. Kutime oni laboras dum 40 horoj ĉiusemajne en laborejo, kvazaŭ regula laboristo.

Ses semajnoj, ofte disaj tra la tuta jaro, estas la seminari-semajnoj. Tiam oni renkontiĝas kun 15-30 aliaj gevolontuloj de aliaj laborlokoj. Homoj en tiuj seminari-grupoj kutime ĉiuj faras similajn volontulajn agadojn, do ekzemple heredaĵ-prizorgado en la kazo de mia seminari-grupo. Dum la seminari-semajnoj oni povas interŝangi spertojn pri la nova laboro, lerni pli da specifaj informoj, renkonti multe da mojosaj homoj kaj – plej grave: amuziĝi!

Volontulaj jaroj bone taŭgas por provi specifan profesion en la reala laborvivo, ekzemple por trovi la ĝustan profesion aŭ por simple fari ion alian dum unu jaro. En Germanio oni povas kutime fari volontulan jaron, ĝis oni aĝas 27 jarojn. La daŭro povas varii de duono ĝis unu kaj duono jaroj; multe da homoj faras unu jaron. La plej multaj gevolontuloj faras sian volontulan jaron post la lernejo, antaŭ ol komenci lerni profesion aŭ ekstudii. Kelkaj gevolontuloj ankaŭ faras ĝin post la unua profesia lernado aŭ studado, por paŭzi iomete aŭ trovi sian venontan vojon.

Kelkfoje per la volontula jaro ankaŭ eblas anstataŭigi bezonatajn praktikajn labortempojn por kelkaj universitataj fakoj, aŭ por lernejoj kaj laborejoj, kiuj instruas profesiojn.



Dum restaŭrado de fera objekto en la metiejo.



Laborante en la metiejo kun Esperanto-T-ĉemizo.

Ĉar la laboro estas volontula, oni ne gajnas monon, kiel kutima laboristo, sed iomete da mono por vivi kaj poŝmonon, ofte iom inter 300€ kaj 420€. En Germanio la gepatroj ja ankaŭ ankoraŭ ricevas la infanmonon de la ŝtato.

Mi pasigis mian volontulan jaron pri heredaĵ-prizorgado en la metiejo por arkeologia restaŭrado de la landa oficejo por heritaĝzorgado en Wiesbaden, Heslando. Arkeologia restaŭrado konsistas el la tasko prizorgi arkeologiajn objektojn post ilia trovo. La kutima laboro okazas en metiejo. La gerestaŭristoj sekurigas kaj konservas la objektojn kontraŭ damaĝoj dum konservado. Krome ili restaŭras, purigas kaj riparas la objektojn, por ke la esplorado de la objektoj funkcii kaj oni povu kompreni la objektojn pli bone – ankaŭ en muzeoj.

Ĉiu en la metiejo estis tre agrabla kaj montris kaj instruis ĉion al mi. En multe da diversaj projektoj mi tre multe povis mem fari kaj mi lernis restaŭri arkeologiajn ceramikaĵojn, glasperlojn, glasuojn, bronzajn objektojn, ferajn objektojn kaj iom pli. Ankaŭ la seminari-semajnoj tre plaĉis al mi. En la seminarioj de la volontula jaro por heredaĵ-prizorgado ĉiam estas multe da metioj. Ni komencis konstrui veran dometon, etan modelon de kradtraba skeleto kaj lernis multe pri heritaĝzorgado. Kaŭze de la koronavirusaj problemoj kelkaj seminarioj okazis rete, sed ili ankaŭ estis tre agrablaj.

Mi tre ĝuis la profesion, miajn entuziasmajn kunlaboristojn kaj tutan volontulan jaron.

Antaŭe mi ŝatis provi la profesion de arkeologia restaŭrado. Dum la jaro mi decidis, ke tiu estas bona profesio por mi. Nun mi studas konservadon kaj restaŭradon por arkeologiaj, etnologiaj kaj artmetiaj objektoj en Stuttgart, ekde oktobro.

Signifa okupo dum la pandemia izolado

Oda

Kiam nia lernejo devis fermiĝi en 2020 pro la kronviroza pandemio, mi estis serĉanta ian signifan taskon, kiu povus iom distri kaj malenuigi min de la distanca lernado.

Tre bonan ŝancon por akiri novajn sciojn pri pluraj lernejoj fako samtempe mi do trovis en la 27-a Historia Konkurso de la Federacia Prezidanto de Germanio, kiu en 2020/21 okazis sub la devizo “Malkvietaj tempoj – Sporto faras kompanion”.

Ne nur la kombino de du tiel diversaj disciplinoj, kiel sporto kaj historio, sed ankaŭ la ofertata varieco de ebloj kreeme sin esprimi, igis tiun historian konkurson sufiĉe alloga por mi. Ekzemple, oni povintus krei ian plurmedian prezenton pri sia temo, krei filmeton, registri podkaston, verki teatraĵon, aŭ eĉ inventi ludon. Bedaŭrinde la bibliotekoj kaj arkivoj estis fermitaj ekde la 1-a de novembro 2020, do la esplorado devis ĉefe okazi en interreto. Tamen, mi sukcesis veni en kontakton kun kelkaj atestantoj kaj unu loka historia esploristo; same mi kondukis intervjuojn kun koncernaj homoj.

Mia komenca skeptikeco pri tio, ĉu mi do tiel simple povus „ekmarŝi“ por alparoli kaj pridemandi fremdulojn, tre baldaŭ forvaporigis. Kiel esperantistoj ni ja estas specialistoj de komunikado kaj konsekvence tre sukcesaj, interagante kun niaj kunhomoj, ĉu ne? Mia temo „La historio de glisflugado sur Hesselberg“ fine eĉ trovis aprobon de la ĵurio, tiel ke mi povis ĝoji ricevi atestilon – subskribitan de la Federacia Prezidanto mem – kiel venkinto je nivelo de la federacia lando Bavario.

Sur la foto: Ricevinte atestilon kadre de la 27-a Historia Konkurso de la Federacia Prezidanto.



JES 2021/22 ne okazos

Michael

Pro la drama evoluigo de la kronviroza pandemio en Germanio, kun koro eĉ pli peza ol lastjare, ni decidis nuligi Junularan E-Semajnon 2021/22, kiu devintus okazi en Lutherstadt Wittenberg de la 28-a de decembro ĝis la 4-a de januaro.

Anstataŭa reta evento ĉi-jare ankaŭ ne okazos. Tamen bonvolu kontroladi la retpaĝon de la evento jes.pej.pl: Eventuale ni konsideros kunordigi, same kiel lastjare, „lokajn JES-erojn“, do etajn, regionajn kunvenojn de esperantumemuloj ĉirkaŭ la novjaro.

Grave, tio signifas, ke ankaŭ nia ĉi-jara membrosambleo, la 30-an de decembro 2021 ekde 11h00, okazos ekskluzive virtuale ĉe meet.jit.si/DEJMV2021.

Restu sanaj, karaj!

Sur la bildo: Neĝhometo priploras nuligitan JES-on.



Malnovaĵoj de GEJ

Evento okaze de nia 70-jara jubileo

Michael

Finfine, la semajnfino de la 3-a kaj 4-a de oktobro, kiel Germana Esperanto-Junularo, ni povis fiere festi nian 70-jariĝon.

Nu, fakte iom trofruigite, ĉar la vera jubileo efektive realiĝis nur la 5-an de oktobro, do la lundon tuj poste. Sed nu, pro tro da jubileemo ni ne povis atendi ĝis la sekva semajnfino. Mi esperas, ke tio ne portos ajnan malbonŝancon.

Okaze de tiu solena datreveno, ni estis invitintaj plurajn iamajn GEJ-aktivulojn por rakonti pri siaj pasintaj spertoj en la asocio. La plejparto el ili nun jam estas sufiĉe for de la GEJ-aĝlimoj, do efektive estis bela oportuno por havi

iom da intergeneracia interŝanĝo: La ne-plu-tiom-junuloj prelegis kaj diskutis pri ilia GEJ-pasinteco, ni, ankoraŭ-junuloj, povis atente aŭskulti ilin kaj ligi iliajn spertojn al nia nuntempa GEJ-agado. Kaj fine, surbaze de ĉio ĉi, ni kune diskutis, kiel daŭripova pluevoluigo de nia asocio povos aspekti en la estonteco. Mi spertis tion kiel tre fruktodonan kaj pensigan kunvenon!

Entute, dum la reta evento regis tre leĝera etoso; eĉ tiel leĝera, ke etan paneon tuj ĉe la komenco ĉiuj partoprenantoj facilanime kaj amuzite pretis pardoni al ni: Fakte tre interesa kaj distra kvizo pri la historio de GEJ, kiun oni kune ludis enkonduke de la kunveno, evidentiĝis iom banala, kiam post ĉiu plia demando oni povis kun pli kaj pli da certeco supozadi, ke la ĝusta el la kvar respondebloj troviĝos ĉiam en la maldekstre-supra angulo... (ĉar iu teknika misagordo okazis, ups.)

La prelegoj kaj diskutrondoj, kiuj okazis poste, estis ege interesaj kaj teme riĉaj. Ni komencis per la foje neglektata historio de la Esperanto-junularo en GDR dum tempoj de la Malvarma Milito. Sekvis rakontoj de aktivuloj, kiuj spertis la periodon de reuiniĝo de Germanio, kaj tiel ankaŭ de la du ĝistiamaj germanaj Esperanto-junularoj. Dimanĉe temis pri la historia kaj aktuala kunlaboro inter GEJ kaj aliaj, ne-Esperantaj asocioj kaj institucioj, sed ankaŭ la kunlaboro inter GEJ kaj GEA. Same, la estiĝo kaj evoluigo de la regulaj vintraj aranĝoj, kiujn GEJ jam ekde jardekoj organizadas, do antaŭe IS-oj, nun – kunlabore kun PEJ – la JES-oj, estis iom prilumita.

Elkoran dankon al ĉiuj, kiuj partoprenis, kaj kompreneble eĉ pli al tiuj, kiuj kontribuis al la programo de nia ĉarma jubilea kunveneto per prelego aŭ gvidado de diskutrondo. Sube vi vidos kompilaĵon de grupfoto, kiun ni faris dum la evento. Espereble, nian 75-jariĝon en 2026 en eĉ pli solena – kaj nepre ĉeesta formato ni povos denove kune festi!

Jen grupfota kompilaĵo, montranta gajajn iamajn kaj nuntempajn Esperanto-junularajn aktivulojn:



Perloj de Gartic Phone

Michael

Vespere la 15-an de novembro, kiel GEJ-anoj ni denove renkontiĝis rete, por iom kune babili kaj ludi.

Unu el niaj plej ŝatataj virtualaj ludoj nomiĝas *Gartic Phone*. La koncepto estas tre simpla: Ĉiu kunludanto devas unue elpensi iun frazon, kiu priskribas situacion aŭ eventon – en nia kazo kompreneble frazon en Esperanto. Poste ĉiu ricevas iun frazon, elpensitan de aliulo, kaj sekve devas provi desegni ĝin. Fininte tion, oni ricevas desegnaĵon de alia persono kaj estas petata denove traduki ĝin al frazo. Dume neniu povas vidi, kion la aliaj skribas aŭ desegnas. Do esence, estas kvazaŭ ia ludo de „rompita telefono“, sed kun pervida elemento. Ĝi ja ege taŭgas por praktiki siajn lingvokapablojn, ĉar por priskribi kelkajn el la dume estiĝantaj, foje tre bizaraj bildoj, oni bezonas precize kaj kreeme vortumi. Sed kompreneble la ĉefa kialo por ludi *Gartic Phone* estas povi amuziĝi poste pri plej absurdaj frazo-bildo-serioj, kiujn oni vole-nevole kune kreis. Tri tiajn perlojn de la pasinta fojo vi povas trovi printitajn ĉi tie...

Bildpriskriboj: (1) Ĉu viruso, ĉu bruna suno? (2) Per kio la fek' oni drogumis ĉi tie? (3) Estimata sinjor' Ludwik Zaaahooo!



Sala kuko

(bazo kaj ideoj por ornamoj)

Ines Elisabeth

Jen recepto por facila sala kuko. Ĝi estas recepto kun simila bazo por ĉiuj kukoj – kaj la ornamo estu laŭ via imago.

Preparado

1. Antaŭvarmigu la fornon je 180°C (350 °F).
2. Komencu miksan la farunon kaj bakpulvoron.
3. Aldonu la ovojn, la lakton, kaj la oleon. Miksu bone.
4. Aldonu la pipron, la salon, kaj miksu. Aldonu la raspitan fromaĝon.
5. Aldonu la ornamon laŭ via plaĉo. Ekzemple:
 - * verdaj olivoj, 1 freŝa tomato, marinitaj kapsikoj aŭ tomatoj, provencaj herboj;
 - * rostitaj kukurbokerno, rostitaj fungoj, kumino;
 - * kapra fromaĝo, nuksoj, 1 freŝa tomato, provencaj herboj; ktp.
- * 1,5 supkukuloj da buljono + 500 ml da akvo
- * 150 g fungoj (ekz. brunaj ĉampinonoj)
- * 1 eta manpleno de freŝa petroselo
- * 1-2 supkukuloj de gistoflokoj



Jen kiel la kuko povas aspekti.

6. Miksu kaj verŝu la preparojn en kukan muldilon.
7. Baku en la forno dum 45 minutoj je 180°C (350 F). Manĝebla varme kun salato kaj iom da balzama vinagro.




Pliaj fotoj pri KEKSO, p. 25-26.



Printempa Semajno Internacia 2022

Ni rezistu la koronan viruson! Helpu sekurigi la pluan planadon de PSI 2022 en Braunschweig! La Printempa Semajno Internacia (PSI) plu vivu!



En novembro 2021 la korona viruso en Germanio denove komenciĝas kiel parto de la kvara ondo kun provo ĉesigi internaciajn renkontiĝojn. La vakcinado en Germanio ne ŝajnas superi nivelon, kiu certigus taŭgan gregan imunecon. Neniu scias nuntempe, kiuj limigoj de la federaciaj, ŝtataj kaj lokaj aŭtoritatoj en Germanio aplikigos en la periodo ĉirkaŭ Pasko 2022, kaj bedaŭrinde tio validas ankaŭ por internaciaj vojaĝoj.

La lasta „reala“ PSI okazis en 2019 kun preskaŭ 80 partoprenantoj en Hochtpeyer en Rheinland-Pfalz, kie ni tre bone amuziĝis kune. Ni devis nuligi la PSI planitan por 2020 en Wittenberg (aŭ prokrastis ĝin unue al 2021 kaj poste al 2023), kaj ni anstataŭigis la PSI-on planitan por 2021 en Braunschweig per virtuala PSI-eto (aŭ prokrastis ĝin al 2022).

En 2022 la PSI okazos en Braunschweig, interesa urbo kun multe da historio. La junulargastejo, kiun ni elektis, aspektas tre freŝa kaj moderna – bela domo, situanta proksime de la urbocentro kaj facile atingebla.

Ni nun petas ĉiujn interesatojn registriĝi frue por la PSI 2022, kiu okazos de la 11-a ĝis la 18-a de aprilo 2022 en Braunschweig, kaj fari la respondajn antaŭpagojn kiam oni petas. La kialo: se ne sufiĉas ricevataj aliĝoj por PSI 2022 ĝis la fino de januaro 2022 – tio estus almenaŭ 70 – tiam la PSI-teamo devos rekomendi al Germana Esperanto-Asocio (GEA) komplete nuligi la kontrakton kun Braunschweig por eviti eblajn grandajn elspezojn.

Do: ni tre volonte ŝatus revidi vin en Braunschweig, pro tio bonvolu aliĝi baldaŭ, por ke la preparoj povu daŭri kaj poste ne estu vanaj. Kaj se vi aliĝas ĝustatempe, vi ankaŭ povas ŝpari monon. Eta noto: GEA en la pasinteco plene repagis la kotizojn por PSI-oj, kiuj ne okazis.

Pliaj informoj pri PSI 2022 en Braunschweig estas haveblaj ĉe <https://psi.esperanto.de>, kie la unua informilo nun haveblas ankaŭ en Esperanto kaj la germana. Aliĝo eblas per <https://psi.esperanto.de/#alighi>.

La bildoj veku vian apetiton por la leona urbo Braunschweig kaj la tiea junulargastejo. Amike salutas la PSI-teamo <https://psi.esperanto.de/teamo>; Stefan Krieghoff + Ralf Haumer

Lasst uns dem Corona-Virus Widerstand leisten! Helft mit, die weitere Planung des PSI 2022 in Braunschweig zu sichern! Die internationale Frühlingswoche (PSI = Printempa Semajno Internacia) soll überleben!

Im November 2021 beginnt das Corona-Virus in Deutschland im Rahmen der vierten Welle erneut mit dem Versuch, internationalen Treffen den Garaus zu machen. Die Impfquote in Deutschland scheint nicht über ein Maß hinauszukommen, das eine hinreichende Herdenimmunität sichern würde. Keiner weiß im Moment, welche Einschränkungen durch Bund, Länder und Kommunen Deutschlands im Zeitraum um Ostern 2022 gelten werden, und dies gilt leider auch für den internationalen Reiseverkehr.

Das letzte „echte“ PSI fand 2019 mit fast 80 Teilnehmern in Hochtpeyer in Rheinland-Pfalz statt, wo wir eine sehr schöne Zeit miteinander hatten. Das für 2020 in Wittenberg geplante PSI mussten wir ausfallen lassen (bzw. haben es erst nach 2021 und dann nach 2023 verschoben), und das für 2021 in Braunschweig geplante PSI haben wir durch ein virtuelles PSI-eto ersetzt (bzw. haben es nach 2022 verschoben).

In 2022 soll das PSI in Braunschweig stattfinden, einer interessanten Stadt mit sehr viel Geschichte. Die von uns gewählte Jugendherberge wirkt sehr frisch und modern – ein schönes Haus, nahe der Innenstadt gelegen und gut erreichbar.

Wir möchten nun alle Interessierten bitten, sich für das PSI 2022, das vom 11. – 18. April 2022 in Braunschweig stattfindet, unbedingt frühzeitig anzumelden und die entsprechenden Anzahlungen nach Aufforderung zu leisten. Der Hintergrund: Gehen bis Ende Januar 2022 nicht genügend Anmeldungen für das PSI 2022 ein – das wären mindestens 70 – dann muss das PSI-Team dem Deutschen Esperanto-Bund (D.E.B.) empfehlen, den Vertrag mit Braunschweig vollständig zu stornieren, um mögliche größere Kosten zu vermeiden.

Also: Wir möchten Euch sehr gerne in Braunschweig wiedersehen, deshalb meldet Euch bitte bald an, damit die Vorbereitungen weiter laufen können und nachher nicht vergeblich sind. Und wenn Ihr Euch rechtzeitig anmeldet, könnt Ihr zusätzlich noch Geld sparen. Ein Hinweis noch: Der D.E.B. hat die Zahlungen für die ausgefallenen PSIs in der Vergangenheit vollständig erstattet.

Weitere Informationen zum PSI 2022 in Braunschweig gibt es unter <https://psi.esperanto.de>, dort ist inzwischen auch das unua informilo in Esperanto und Deutsch verfügbar. Die Anmeldung ist möglich per <https://psi.esperanto.de/#alighi>.

Die Bilder mögen ein bisschen Lust auf die Löwenstadt Braunschweig und die dortige Jugendherberge machen.

Es grüßt das PSI-Team
<https://psi.esperanto.de/teamo>
Stefan Krieghoff + Ralf Haumer





En 2022, PSI okazos en Braunschweig,
interesa urbo kun multe da historio.